

## ALIGILO

Komuna al la 8-a Azia Kongreso de Esperanto  
kaj la 5-a ILEI\*-Seminario en Orienta Azio

Familia nomo:

Persona nomo:

Sekso:  viro  virino

Lando:

Poŝta adreso:

Retpoŝta adreso:

La aliĝkotizo estas:

ĝirota al UEA-konto aekm-d  
(kun mencio "por la 8-a Azia Kongreso")

pagota ĉe la kongresejo

pagota al landa peranto ĈEL, JEI aŭ KEA  
(Pri perantoj en aliaj landoj, informiĝu ĉe la kongresa retejo.)

Mi deziras la oficialan komunan foton de la kongreso. (aldonu 8 eŭrojn)

Jes  Ne

\*ILEI=Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



Emblemo de la 8-a Azia  
Kongreso de Esperanto

### Kongresejo

◆ **Hotelo Quanzhou Huaqiao** 泉州华侨大厦  
Adreso: 1# Baiyuan-lu, Licheng-qu,  
Quanzhou-shi, Fujian-sheng, Ĉinio, CN 362000  
<http://www.overseaschinesehotel.com>

### Alveno al la kongresejo

■ **De la internacia flughaveno Gaoqi en la urbo Xiamen**  
prenu rektan buson (25 seĝoj) al la Hotelo Quanzhou Huaqiao (kongresejo).

*Horaro: 09:30, 11:30, 13:30, 15:30, 17:30, 19:30*

■ **De la Fervoja Stacidomo Xiamen aŭ Xiamenbei**

1e: Prenu buson de flughaveno al la stacidomo,  
2e: Prenu trajnon al Quanzhou,  
3e: Prenu buson n-ro 3 al la Hotelo Quanzhou Huaqiao (kongresejo).

■ **De grandaj urboj en Ĉinio (ekz. Pekino, Ŝanhajo, Guangzhou)** flugas aviadiloj al la internacia flughaveno Jinjiang en la urbo Quanzhou. De la flughaveno Jinjiang, prenu buson n-ro 16 al la Hotelo Quanzhou Huaqiao (kongresejo).

■ **De Kantono, Xiamen k.s.** uzeblas buso al Quanzhou.



Kongresejo



# Bonvenon al la 8-a Azia Kongreso en Quanzhou!

Quanzhou situas en Fujian-provinco, suda Ĉinio. Ĝi fieras pri sia agrabla duontropika klimato, kaj alvenante al la urbo vi sentos ekzotikecon ne tipan por ĉina urbo. Ne senkiale, ĉar jen la komenca punkto de la mara itinero de la Silka Vojo.

Malfermita kiel havenurbo dum la dinastio Tang (618-907), Quanzhou atingis sian apogeon dum la dinastioj Song (960-907) kaj Yuan (1279-1368). Tiam ĉi tie loĝis eĉ hindoj, araboj kaj persoj. Ĝis nun funkcias moskeoj kaj eblas trovi spurojn de diversaj aliaj religioj. Iuj supozas, ke en Quanzhou loĝis Sindbado la Maristo, fama figuro el *Mil kaj unu noktoj*. Marco Polo notas la ŝajne *arablingvan* nomon de tiu ĉi urbo “Zayton”, kaj ĝin registras ankaŭ la islama vojaĝisto Ibn Battuta.

Pro tia historia fono en Quanzhou ankoraŭ nun regas etoso de interkulturaj aventuroj. Venu do ĉi tien por ĝui tiun etoson, kaj tio helpos vin ricevi inspiron por la perspektivo de Esperanto en Azio! La aventuroj de iamaj ŝipistoj similas al tiuj de nunaj retumantoj, kiuj virtuale navigas, ĉu ne?

## Vetero en Quanzhou

*En novembro la loka vetero estas milda. Averaĝe la plej alta temperaturo estas 24 celsiaj gradoj, la plej malalta estas 16 gradoj. La meznombra pluvokvanto estas 18 milimetroj.*

## Ĉefaj programeroj (provizoraj)

**La 3-a, ĵaŭde,** *Akceptado en la hotelo ĝis 20:00*

14:00–17:00 Prelegoj

19:00–21:00 Interkona Vespero

**La 4-a, vendrede,**

10:00–11:30 Inaŭguro

14:00–17:00 Kunsido pri E-movado en Azio

14:00–17:00 Eduka programero

19:00–21:00 Nacia Vespero

**La 5-a, sabate,**

09:00–12:00 E-movado kaj eduka programero

14:00–17:00 Promenado en Quanzhou

19:00–21:00 Internacia Vespero

**La 6-a, dimanĉe,**

09:00–11:30 Vizito al Quanzhou-muzeo

14:30–15:30 Fermo

**\*Paralele okazos ankaŭ la 10-a jarkunveno de IKEF-Ĉinio (komercistoj).**

**\*Kelktaga postkongresa ekskurso planata.**

## Kotizo

**60 eŭroj** por A-landoj, **30 eŭroj** por B-landoj/junulo malpli-ol-30jara/kunulo/handikapulo.

**A:** Ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B.

**B:** Iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio, Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

## Loĝ-kostoj

**100 eŭroj** por persono (25 eŭroj/nokto/lito\*4 noktoj). 4 tranoktoj kaj matenmanĝoj inkluzivitaj. 1 eŭro estas ĉ. 7.50 RMB.

## Rimarkoj

■ La limdato por la pago de la kongresa kotizo kaj hotelmendo estas **la 10-a de oktobro 2016**.

Eblas aliĝi al la kongreso pli poste aŭ eĉ surloke, sed tiakaze vi devas mem zorgi tranoktejon.

■ La pagita aliĝkotizo **ne estos redonita** eĉ se vi efektive ne ĉeestos la kongreson.

■ Se vi estas **handikapulo** aŭ havas speciala(j)n kondiĉo(j)n, anoncu tion al LKK.

■ Kongresano mem zorgu pri la akiro de **enir-vizo al Ĉinio** kaj **asekuro** por eksterlanda vojaĝo.

◆ Ĉu vi havas ion specialan por kontribui al la Azia Kongreso (ekz. Internacia Vespero)?

◆ Ĉu vi interesiĝas pri la postkongresa ekskurso?

Jes

Ne

◆ Libera komento

## Kiel aliĝi kaj kiel mendi?

Aliĝu al la kongreso kaj mendu hotelĉambron prefere *sendante retmesaĝon* al la Loka Kongresa Komitato aŭ *tra ĝia retejo*.

## Loka Kongresa Komitato (LKK)

**Retadreso:** [aziakongreso@163.com](mailto:aziakongreso@163.com)

**Retejo:** <http://www.esperantoazia.net/>

**Poŝta adreso:** p/a Ĉina Esperanto-Ligo,  
P.O. Box 825, Beijing, Ĉinio, CN-100037

**Telefona:** +86 10 68321808;

+86 10 68995937

**Fakso:** +86 10 68337118